Дмитрий Николаевич Садовников,

# Volga, Volga (Stenjka Rasin)

*tradukita de Kristian Langgaard*

De malantaŭ la insulo
sur la ondoj de l' river'
iras ŝipoj multkoloraj,
flirtas flagoj en aer'.

Sur l' antaŭa Stenjka Razin;
festas la edziĝon li
al princino el Persujo
en varmega amebri'.

Sed la viroj murmuregas:
"Tute li forgesis nin.
Nin virino anstataŭos.
Li fariĝis mem virin"'

Tiun mokon aŭdas Stenjka,
la terura ataman'.
Ĉirkaŭbrakas la persinon
li per sia forta man'.

Li la nigrajn brovojn sulkas
Fulmotondro estas li.
En okuloj liaj estas
nun videbla sangebri'.

...

Дмитрий Николаевич Садовников,

# Sten'ka Razin

*tradukita de Frieder Weigold*

1. De l' insulo, de la verda,
Dum la tempo de la car',
Naĝas vico da boatoj,
La arme' de l' kozakar'.

2. Sur l'unua Sten'ka Razin.
Oni gaja vidas lin.
Feliĉega tiu tago!
Li edziĝis kun princin'.

3. Ŝi mallevas la okulojn.
Kvazaŭ inter viv' kaj mort'
Ŝi aŭskultas en silento
Al sincera, firma vort'.

4. Liaj viroj tamen grumblas:
"Post nur unu nokto jam
Faris ŝi lin mem virino.
Li perfidas nin pro am'!"

5. Tion aŭdas kolerante
La kozaka kapitan'.
Kaj li kaptas la princinon,
Per la forta, ega man'.

...

“Nu fordonu, mi trezoron
la plej belan de l’ amant’!”
sonas lia tondrovoĉo
trans la ondojn al la strand’.

La princino mortpaliĝas
(Timo estas en l’ okul’)
kaj silente aŭdas jenajn
vortojn de la terurul’:

”Volga, Volga, patrineto!
Volga, via estu ŝi!
Ne antaŭe Don-kozakoj
donis tian-ĉi al vi!

Inter liberuloj estu
- Volga, Volga, patrinet’
nek malpaco nek batalo!
Tial - jen la virinet’!“

Kaj li ĵetas la persinon
(la plej karan sur la ter’)
en la bluan profundaĵon,
kaj ŝin glutas la river’.

“Nun agordu balalajkojn!
Ludi, danci volas ni!
Estu gajaj, kamaradoj
je la belmemor’ pri ŝi!”

. . .

6. Fulmas la okuloj duraj,
Flame ŝtormas la koler’!
Kaj eksonas lia voĉo
Krudglacie kiel fer’:

7. “Ion ajn, eĉ mian kapon
Ja fordonus mi por vi!
La feliĉon mi ja trovis.
Ĉio estas ŝi por mi!

8. Volga, Volga, kara panjo,
Ho rivera rusa vi!
Kiam vidis vi oferon,
kian nun fordonas mi?

9. Ke neniam ni kverelu
Pro la persa belulin’:
Volga, Volga, kara panjo -
La oferon - prenu ĝin!”

10. Kaj per ambaŭ fortaj manoj,
Dum ektimas la princin’ -
Ve, deborde ŝin li puŝas! -
Kaj la ondoj voras ŝin!

11. “Diabloj! Kial vi silentas?
Dancu, kantu ja pro ŝi!
Kaj eksonu la kantado,
La fratara melodi’!”

. . .

Jen dum kanto, danco, ludo
sur la ondoj de l' river'
iras ŝipoj multkoloraj,
flirtas flagoj en aer'.

*Traduko de la Rusa poemo "Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)" de* Дмитрий Николаевич Садовников *(Dmitrij Nikolajeviĉ Sadownikow, ∗1847 – †1883) en Esperanton de* Kristian Langgaard *(∗1894 – †1957).*

*Arg-478-1036 (2010-03-08 21:19:37)*

*Mi, Manfred Retzlaff, prenis tiun ĉi esperantigon el la reta kolekto "http://www.esperantonia.dk". kiun kunmetis s-ro Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, DK4640 Fakse, Danio,* `lars.kromann@mail.dk`*). Vidu la retejon* `http://www.esperantonia.dk/volga.htm`*. Kristian Langgaard estis dana Esperantista verkisto kaj Esperanto-instruisto. Vidu ekzemple:* `http://www.esperantonia.dk/lingvaj.htm`*. Pri lia vivo kaj verko vidu ankaŭ la artikolon* `http://www.esperantonia.dk/bio-langgaard.htm`*.*

12. De l' insulo, de la verda,
Dum la tempo de la car',
Naĝas vico da boatoj,
La arme' de l' kozakar'.

*Traduko de la Rusa poemo "Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)" de* Дмитрий Николаевич Садовников *(Dmitrij Nikolajeviĉ Sadownikow, ∗1847 – †1883) en Esperanton de Frieder Weigold.*

*Arg-478-928 (2009-10-30 16:18:33)*

*Mi, Manfred Retzlaff, ricevis en 2008-10-09 tiun ĉi Esperantigon de la konata rusa kanto de s-ano Frieder Weigold (Birkenstr. 12, D-82178 Puchheim), dum kunveno de la Munkena Esperanto-grupo.*